


Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2007 numero 4-a: oktobro-decembro



Fotis Claude Gacond

Jen André Sandoz-Giroud pretiganta la dissendon de *SES informas*.

En la CDELI-salono li unue stampas la kovertojn kaj gluas la adresojn, kiujn pretigis la SES-kasisto Hans-Werner Grossmann. Kaj kiam la bulteno eliras la printejon, li samtage revenas por ĝin enkovertigi, kio ebligas tujan dissendon.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,
Stefano Keller, Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2008-1 : januaro-marto :
januare 15.

2008-2 : aprilo-junio :
marte 15.

2008-3 : julio-septembro :
junie 15.

2008-4 : oktobro-decembro :
septembre 15.

Konsultu la retejon de SES !

www.esperanto.to/ses

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
032 932 18 88.

Retpoŝto : mireille-grosjean@rpn.ch

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-
Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2007-4 - verkita de Stefano Keller

***Propono pri Nobel Pacpremio al UEA
fare de du svisaj, neŭŝatelaj parlamentaninoj
Gazetara konferenco en CDELI***



Grava evento kunvenigis en CDELI du neŭŝatelajn parlamentaninojn kaj reprezentantojn de la svisa esperanta mondo kun ĵurnalistoj, kadre de gazetara konferenco, ĵaŭde, la 22an de novembro 2007. La celo estis informi publike pri la kialoj de la kandidatigo de UEA por la pacpremio de Nobel.



S-inoj Gisèle Ory, svisa ŝtatara konsiliano, Mireille Grosjean, kunprezidantino de SES kaj Francine John-Calame, svisa nacia konsiliano - dum la gazetara konferenco en CDELI



Gisèle Ory

Alportis do sian frukton la daŭra informado pri Esperanto adresita al la amaskomunikiloj, politikistoj, ŝtataj kaj urbaj funkciuloj. Tiun aktivecon realigas *Mireille Grosjean* jam de jaroj. Nuntempe, pli kaj pli kompletigas la poŝte dissenditan materialon reta sendado de informoj al ĵurnalistoj, radio- kaj televidstacioj, retaj agentejoj kaj diversaj retejoj. Ankaŭ la facila persona kontakto kun politikistoj en Svislando ludis sian rolon en tiu atingo.

Malfermante la konferencon, *S-ino Gisèle Ory* substrekis la gravecon de la kontribuo de Esperanto al la klopodoj por paco. Laŭ tiu konsidero maturiĝis la ideo dum diskutoj parlamentanaj pri kandidatigo de

UEA por la Nobel pacpremio. Tiu premio alportus al Universala Esperanto-Asocio ne nur konsiderindan monsumon, sed ankaŭ simbolan signifon de agnosko. La lingvo internacia lokiĝus en la fokuson de intereso, de atento, la amaskomunikiloj multe parolus pri ĝi. Tiel ĝi povus esti pli larĝskale konata, akceptita kaj ricevi pli favorajn kondiĉojn por povi pli vaste inkludi sian rolon de ligilo inter popoloj.

La UNESKO-rezolucioj de 1954 (Montevideo) kaj de 1985 (Sofia) estis meciitaj kaj laŭlegitaj por la ĉeestantaj ĵurnalistoj, elmontrante la fakton, ke la monda organizo jam dufoje agnoskis la utilecon kaj gravecon de la esperanta movado. Tio estas signifa elemento en la kandidatigo de UEA por la mondfama, enviata kaj prestiĝa titolo.

Sekve *S-ino Francine John-Calame* parolis pri la paco kaj pri la roloj de Svislando kiuj estas parto de ties politiko vidalvide al aliaj ŝtatoj: aktivecoj favore al paco, defendo de la homaj rajtoj, respektigo de la demokratio kaj de la internacia juro.




Proponante la atribuon de la Nobel pacpremio al Universala Esperanto-Asocio, la parlamentaninoj esprimas sian apogon al la valoroj kaj celoj de la esperanta movado, kaj tiel deziras kontribui al la deca festado de la 100-jara jubileo de la monda organizo de la esperantistaro.

S-ino Francine John-Calame prezentis al la ĵurnalistoj la ĉefajn ecojn de Esperanto, la argumentojn, kiuj pruvas ĝian taŭgecon por tiu kandidatigo: ĝi estis kreita por esti neŭtrala helplingvo, facile lernebla kaj apartenanta al neniu potenco ŝtata por eviti la riskon de kultura uniformigo.

Esperanto ne malhelpas la popolojn uzi kaj evoluigi sian propran lingvon kaj ebligas la egalecon en la rilato de la personoj, kiuj per ĝi komunikas inter si. Plia avantaĝo rezultanta el la lernado de Esperanto estas la akiritaj lingvaj kapabloj, kiuj faciligas la



Mireille Grosjean



Francine John-Calame

alproprigon de aliaj lingvoj. Ĝi estas lingvo kiu ne konas obstaklojn kaj servas kiel interligilo por personoj ne nur el diversaj lingvoregionoj, popoloj kaj kulturoj, sed ankaŭ apartenantaj al diversaj grupoj sociaj kaj profesiaj.

S-ino Mireille Grosjean, parolis pri la novspeca rilato interhoma, kiun ebligas Esperanto, kaj en kiu ne gravas la landlimoj nek nacia aparteno: temas pri rilato inter homo kaj homo. Ŝi menciis praktikajn ekzemplojn de la uzo de Esperanto: interrilatigo de indiĝenaj popoloj, vojaĝoj, kongresoj, fakaj organizoj. Ŝi informis pri la jama pozitiva eĥo tutmonda de tiu altnivela apogo al Esperanto, elsendo de Radio Havana, Kubo.

Intervenis dum la gazetara konferenco ankaŭ *S-ro Claude Gacond*, kiu parolis pri sia tiama deĵorado kiel esperantlingva kronikisto ĉe Svisa Radio Internacia kaj pri la rolo kaj funkciado de CDELI, kies kreinto kaj arkivisto li estas. Li diris ankaŭ historiajn faktojn pri la evoluo de Esperanto kaj koncize eksplikis la funkciadon de la lingvo.

Responde al la demando pri disvastiĝo de Esperanto, *Stefano Keller* informis pri siaj spertoj per la agado

Atentemaj ĵurnalistoj



Esperanto en Maŭricio kaj pri sukcesoj de la esperantlingvaj kantistoj el la Hinda Oceano.



Intervjuo kun Luc Allemand por Le Temps

Sekve de tiu tre sukcesa gazetara konferenco aperis pluraj artikoloj en svisaj gazetoj. Retaj publikaĵoj, radio- kaj televid-elsendoj estis registritaj kaj baldaŭ aperos rete.

Alia tre signifa rezulto de la kandidatigo de UEA por la Nobelpremio estas la intenco de deputitoj, sendi

leĝproponon pri enkonduko de la uzo de Esperanto en lernejoj (instruado nedeviga), en informado (traduko de bazaj ŝtataj dokumentoj). Por legi pli, vizitu: <http://www.kontakto.info/lingvoj.html> aŭ <http://minilien.fr/a0k7cd>



*Claude Gacond
inter la
parlamentaninoj*

Literatura tago *SES-renkontiĝo en Berno* *la 13an de oktobro 2007*


Lernemaj partoprenantoj el tuta Svislando plenigis la salonon de la Berna hotelo, kie okazis, sub aŭspicio de SES, intervjuo kun **Willy Nüesch** kaj prelego de **Giorgio Silfer**. La *Literatura tago*, kiun organizis **Bruno Graf**, unu el la nelacigeblaj motoroj de la svisa esperanta vivo, estis tre informriĉa kaj instruplena aranĝo pri la esperanta kulturo.

Intervjuo: Willy Nüesch, tradukanto de filozofiaj kaj literaturaj verkoj

Antaŭtagmeze, Bruno Graf intervjuis la pastoron Willy Nüesch, kiu tradukas kaj eldonas, interalie, antropozofiajn verkojn de *Rudolf Steiner*.



Bruno Graf



Willy Nüesch kun sia tradukaĵo:
Don Karlos de *Friedrich Schiller*

Tiu idearo, kiu celas kreon de pli alta konscio, ĉerpiĝis el plej diversaj fontoj: okultaj, ezoteraj kaj aliaj. Willy Nüesch, intima konanto de la tekstoj kaj filozofio de Steiner, lerte klarigis al ni pri la elementaj konceptoj de la antropozofio, kiuj entenas ankaŭ la ideojn de reenkarnejo kaj de karmo. La gvidlinioj de tiu spirita scienco estas ankoraŭ aplikataj en preskaŭ milo da tielnomataj „Valdorfaj“ lernejoj kaj infanĝardenoj, en sesdeko da landoj. Proksime de Bazelo, en Dornach (Svislando) troviĝas la *Goetheanum*, sidejo de antropozofoj por arto, spiritaj studoj kaj kuracado. Krom la filozofiaj verkoj de Steiner, Willy Nüesch tradukis ankaŭ germanajn klasikaĵojn de: *Goethe, Schiller, C.F. Meyer*.



Riĉa ekspozicio ilustris la multjaran laboron de Willy Nüesch kaj pluraj partoprenantoj ĝojis aĉeti la famajn verkojn en esperanta versio.



Gesinjoroj Nüesch

Dum la posttagmezo de la Literatura tago okazis la prelego de Giorgio Silfer. Sekvas raporto de Nancy Fontannaz, unu el la atentemaj partoprenantinoj de la evento.

William Auld - prelego de Giorgio Silfer




Giorgio Silfer brile prelegis pri William Auld kaj poste korsiĝe legadis la unuan kanton el lia verko *La infana raso*. La poeto William Auld (1924-2006), el Skotlando, lernis esperanton jam 12jara, uzante ĝin kiel sekretan lingvon kun sia amiko John Islay Francis. Tiu estos konata pro sia proza verkaro (*La granda kaldrono, Vitralo*), dum William Auld prezentos ĉefe poemojn (*La infana raso*), teatraĵojn, tradukojn, sed ankaŭ didaktikajn verkojn (*Paŝoj al plena posedo*).

Dum la dua mondmilito Auld deĵoris en la flugarmeo, kiel Francis. Tiu restis en Eŭropo, kaj partoprenis la « Elŝipiĝon » de 1945, dum Auld batalis en Egiptio.

Ili estis idealistoj, kiuj kredis je promeso de plibona mondo. Ekde 1946 ili elreviĝis, sentis sin perfiditaj kaj vivis grandan krizon, kiel multaj tiuepoke en Eŭropo, pro la kruelaĵoj de la milito: homo ne meritas fidon... Por la eŭropanoj la krimoj en Eŭropo estas pli gravaj ol tiuj de la japanoj... La holokaŭsto ne estas akceptebla sur eŭropa tero...

Profesie Auld instruis la anglan literaturon. Lia modelo estis la avangardista Pound, kiu bedaŭrinde subtenis la naziismon sed admiris Dante, la epopeojn, la kantojn ...



D-ro Giorgio Silfer

La infana raso: kial tiu titolo? Ĉar li rigardas la homaron ne ankoraŭ matura. La unuaj kantoj estis verkitaj unue en la angla sed Auld baldaŭ decidis verki tiun epopeon en Esperanto. En la unua poemo li diras, ke ni havas nenion por fieri, ni estas idoj de granda miksaĵo, bastardoj... Li detruas la fierecon pri sango,

raso, etno... Li kritikis militon, kiu plej ofte celas superecon kaj povon... La 10a poemo estas interesa: ĝi konsistas nur el 5 vortoj, kiuj resumas la tutan vivon sur la tero: *terformiĝo*, *vivapero*, *Sargono* (unua civilizo), *Aleksandro* (la Granda, kiu unuigis la tutan tiaman teron), *Zamenhof*.

Por William Auld la lingvo estas ne nur komunikilo, sed mondpercepto: ekzemple la homaranismo de Zamenhof. La tolstojanoj, la judoj, la francaj kosmopolitoj estis pli sentemaj al esperanto, ĉar pli sentemaj al mondpercepto... La lingvo estas komunikilo ĉefe kiam ĝi estas arta.

En januaro 1955 aperis *La infana raso* eldonita de Regulo Peres. Auld dediĉis ĝin al Ivo Lapenna, ĵusa venkinto de Montevideo, kie, la 10an de decembro 1954, rezolucio de Unesko agnoskis la ekziston de esperanto.



D-ro Silfer diskutas kun siaj aŭskultantoj

Por Auld ĉiuj poetoj estas valoraj, la poetoj de la nuno pli gravas ol tiuj de la paseo (ĵaluzo), sed malpli ol tiuj de la futuro (envio). Kiam li retrovas iom da optimismo, li skribas, ke nia vivo daŭras rilate al eterneco nur kelkajn sekundojn, sed por ni tiu sparko estas tiel grava, ke ni ne volus rezigni pri ĝi...

Kalocsay, kies vivo konsistis el 3 partoj sen rilatoj: profesio, familio, esperanto, plendis esti poeto sen popolo. Auld, male, ne sentis tion... Li havis sukceson. Por Auld, kiel por Baghy, esperanto estis ilia tuta vivo...

La libro *En barko senpilota* entenas 4 verkojn: *La infana raso* (1954, eldonita en 1956), *Unufingraj melodioj*, *Humoroj*, *Kvaropo* (1952). Tiun lastan verkis William Auld, John Islay Francis, Reto Rossetti kaj John Sharp Dinwoodie.

Kun Marjorie Boulton, kiu ankaŭ naskiĝis en 1924, li skribis *Rimleteroj-n*. Marjorie multe admiris lin kaj havis sintenon de disĉiplo, minora figuro apud li.

En *Pajleroj kaj stoploj* oni trovas kolekton de originala prozo: 7 rakontoj de Auld. Li mem tradukis la faman romanon *La Mastro del'ringoj-n*, sed laŭ Giorgio Silfer, Auld ne estas tiel bona en tradukarto kiel en originalaj poemoj. Tamen, *Aniario* estas bona traduko, laŭ Giorgio kaj Auld mem.

En 1957 li kreis signifan verkon por la epoko: *Esperanta antologio*. Sed ĝia dua eldono de 1981 ŝajnas malpli bona, pro aldono de poetoj duarangaj.

Auld estis redaktoro de kelkaj gazetoj: *Norda Prismo*, *Belarto*, *Fonto*, sed ĉiuj ĉesis aperi. Kontraŭe al Kalocsay, li ne multe korektis la artikolojn...

Mi ne povas ĉion rakonti, sed vi jam havas ideon pri la riĉa prelego, kiun ni feliĉe aŭskultis! Dankon al Bruno Graf, kiu organizis la tagon, kaj dankon al Giorgio Silfer, kiu fake kaptis nian atenton!

Nancy Fontannaz



Fotoj de Stefano Keller. Vidu ĉiujn fotojn en la reta galerio:
<http://www.esperanto-gacond.ch/galerio>

7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio

Maribor, Slovenio, 28.07-04.08 2007



Por efika kaj maldiskriminacia komunikado

Raporto de Anita Altherr

Kiel komisiito de Svisa Esperanto-Societo, mi partoprenis la ĉi-jaran kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en Maribor. Ĉeestis 256 personoj el 29 landoj.

Ĉefa temo de la kongreso estis *la akvo* kaj ties diversaj facetoj: natura, ekologia, scienca, spirita-religia. La evento havis tre abundan programon, ĝi estis kvazaŭ UK. Ĉiu el la programeroj estis altira kaj pluraj okazis samtempe. Tiel ne estis facile decidi, kiun elekti. Unu el ili estis *Interkultura dialogo kaj komunikado*, kiun ĉeestis ankaŭ du EU-parlamentanoj, S-inoj *Malgorzata Handzlik* el Pollando kaj *Ljudmila Novak* el Slovenio.

La kultura parto estis riĉa kaj tre varia. Elstaraj estis la prezentadoj de la franco H. de Sabates en *Stilekzercoj de Queneau* kaj de la serboj, S. kaj A. Pilipoviĉ en la monodramo *Galileo*. Da muziko ni povis ĝui diversajn stilojn: klasika, religia disaŭdiĝis en la katedralo dum piano-koncerto de J. Wagner, nuntempaj, modernaj komponaĵoj estis kantataj de G. Handzlik, JOMO, A. Schlimmer kaj aliaj esperantaj artistoj.

Paralele kun la kongreso, sur la monto Pohorje okazis Infana Kongreseto, kio estis premiero dum EEU-kongreso. Dum la ferma programo ni povis konstati kaj aplaŭdi la lingvan progreson de ties partoprenantoj.

Ekskursante ni povis malkovri la belecon de Slovenio, kiu ravis nin. Entuziasme ni navigis sur rivero, vizitis la urbon. Romantikis promenado en la stratetoj de la ĉarma Maribor, plie allogis la riverbordo de Drava, sed bedaŭrinde mankis tempo por tiu plezuro.

Signifoplena evento estis la hiso de esperanta flago en la ĉefplaco de Maribor, kun ĉeesto de reprezentantoj de la lokaj aŭtoritatoj. La prezidanto de EEU, S-ro Seán Ó Riain en sia ferma parolado dankis la organizantojn (Z. Tisljar kaj familio Obradovic), prelegantojn kaj artistojn pro ilia kontribuo kiu permesis sperti altnivelan kongreson.

Donacoj ricevataj en julio, aŭgusto kaj septembro 2007

Sume: 210.- svisaj frankoj.

Donacintoj:

S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20); S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen (35); S-ro Hans Meier, Basel (25); S-ino Nicole Piron, Gland (15); S-ro Didier Cornuet, Genève (25); S-ro Paul Scherer, Emmenbrücke (5); S-ro Henri Wettstein, Versoix (50); S-ro Fritz Wassmann, Hinterkappelen (5); Ges-roj B. J. kaj R. Van Pujenbroek, Winterthur (30)

Nome de SES Hans-Werner Grossmann, la kasisto, dankas la donacintojn pro ties malavara subteno al nia societo.

Novaj patronoj, 2007

Tazio kaj Teresita Carlevaro, Bellinzona, Renate Heer, Bern, André kaj Marianne Rochat-Girod, Grandvaux, Wassmann Fritz, Hinterkappelen.

Ĝenerala Kunveno de SES

la 12-an de aprilo 2008

okazos en La Chaux-de-Fonds (se ne alvenos alia propono)

Tagordo

1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj
2. Evoluo de la membraro
3. Akcepto de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2007 (Ĝenevo)
4. Vivo de la societo: akcepto de la estrarraporto
5. Financoj. Prezento kaj akcepto
6. UEA kaj ILEI: delegitoj.
7. Laboro plenumita de la estraro, projektoj 2008.
8. Nova svisa esperanto-revuo, perspektivoj de grupa - tutsvisa vivo.
9. Buĝeto 2008
10. Diversaĵoj

Proponoj al la tagordo devas atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets, aŭ rete: mireille.grosjean@rpn.ch ĝis la 4a de aprilo 2008. Proponoj devas esti subtenataj minimume de tri personoj.

SES-estrarkunsido

okazinta la 10-an de novembro 2007, en Bielo

Resuma protokolo

Ĉeestis Mireille Grosjean & Dietrich Weidmann, kunprezidantoj;
Stefano Keller, sekretario. Senkulpigita: Hans Grossmann,
kasisto.

*Staras ĉi tie nur tre konciza priskribo de temoj, kiujn ni pritraktis,
detaloj aŭdiĝos dum la ĜK*

Enciklopedio:

Post apero de la granda verko de Andy Künzli, unu el la gravaj eventoj de la lastaj tempoj en Svislando, oni povas konstati ĝenerale pozitivajn rezultojn, eĥojn, ĉu ili estas papergazetaj, ĉu retaj.

Konkurso Esperanto:

Per la lanĉo de tiu konkurso, La Stelo faras bonegan laboron kaj kreis alian grandan eventon pri Esperanto. La estraro de SES deziras kunlabori en la prizorgado de ĉiu aliĝinto, eĉ de tiuj post la 100-a kandidato. Ni antaŭvidas okazigon de aliaj konkursoj, al kiuj jam sinanoncis apoganto.

Loka, grupa vivo – tutsvisaj aktivecoj, taskoj:

Ni cerbumis pri tio, kiel povus SES pli bone utili al la lokaj grupoj, kiel pli bone servi ilin. Kiujn taskojn transprenu SES por lasi la lokajn grupojn pli komforte aktivi kaj direkti siajn fortojn plene al la agadoj?

Vikipedio:

Por plifortikigi la pozicion de Esperanto en la lingvomondo, ni sugestas al redaktemuloj, krei artikolojn en la esperanta vikipedio pri Svislando, urbo, vilaĝo, specialaĵoj lokaj, ktp. Kelkfoje ni devas defendi esperantan paĝon.

Nova svisa (ne nur pri-) esperanta magazino de SES - agadoj en 2008:

Granda projekto estas naskiĝanta – magazino deca je prezentado, kian oni atendus de Svisa Esperanto-Societo. Riĉenhava, diverstema, alloga, informa ĝi devas esti. – 2008: internacia jaro de lingvoj kaj 100-jariĝo de UEA! Taskoj pri signifaj eventoj atendas kunlaboron de agemuloj kompetentaj. Kiu kunagos ?

*La estraro kunsidos ankoraŭ antaŭ la Ĝenerala Kunveno.
Agrablajn festojn! Via sekretario, Stefano Keller*



Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoj : claude.gacond@ne.ch, martine.schneller@ne.ch, nancy.fontannaz@ne.ch



Fotis Stefano Keller

En la biblioteka salono Charles Humbert dudeko da interesatoj aŭskultas Reinhardon Haupenthal, kiu prelegas pri Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük. Dum tiu sabata seminario de la 1-a de septembro ili tiel malkovris en kiaj politikaj malfacilaĵoj pastro Schleyer devis agadi, ne nur koncerne al la diskonigo de sia lingvo-projekto, sed ankaŭ al sia pastra aktiveco. Sekve al prediko malplaĉinta al la aŭtoritatoj politikaj kaj religiaj li eĉ estis enkarcerigita.

La densan tekston de sia raporto pri similaĵoj kaj malsimilaĵoj inter Volapük kaj Esperanto, kaj inter ties proponintoj Schleyer kaj Zamenhof, Reinhard Haupenthal nun estas mem eldonanta. Tiel en la libroservo de CDELI tiu dokumento do baldaŭ aĉeteblos.

Claude Gacond

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Claude Gacond, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **2008 januare 19, februare 16, marte 15, aprile 19 kaj junio 21.**

Kultura seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **2008 februare 2, junio 7.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo. Ĉi-sezone ni dediĉas nian atenton al la revuo *Literatura Mondo*, kaj al la verkistoj, kiujn ĝi kunigis kaj diskonigis, kaj al la decidiga influo, kiun la budapeŝta skolo havis por al la gramatika stabiligo de esperanto mem.

Horaro de ambaŭ aranĝoj

10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.45 : Oficiala malfermo, formiĝo de la stud-rondoj. 11.00 : Studo. 11.45 : paŭzo.

12.00 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo.

14.15 : Studo. 15.00 : paŭzo. 15.15 : Studo.

16.00 : Konkludo kaj teumo, librovendo.

17.00 : Oficiala fermo.

Aliĝo : **Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminarioj sabatoj** ĉiu bon-

volu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo antaŭ la koncerna aranĝo **al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete : nancyfontannaz@freesurf.ch.**

Partopren-kotizo : Por minimuma kovro de la elspezoj la partopren-kotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj).

Vivo de CDELI

Por subteni la aktivecon de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds ĵus kreiĝis asocio de La Amikoj de la Biblioteko. Per sama statuta bazo ni paralele kreas similan asocion, kiu sub la nomo La Amikoj de CDELI pruvos, ke ankaŭ CDELI havas amikaron kaj apogantaron preta alporti monhelpon kaj apogon koncerne al subvenci-alvokoj.

Pri ĉio tio ni raportos en la venonta numero de nia bulteno kun la espero, ke multos tiuj, kiuj decidis sin proklami Amikoj de CDELI.

Dankon al Martine Schneller


La kulturalan seminarion de la 1-a de decembro konkludis amika renkonto kun Martine Schneller, emeritiĝanta el sia funkcio de bibliotekisto de CDELI. Ŝin ĉirkaŭis parencoj, amikoj kaj konatoj kun intereso pri ŝia aktiveco. Nome de la biblioteko la ĉefbibliotekisto Gérard Donzé raportis ne nur pri la precizeco de ŝia RERO-katalogado, sed ankaŭ pri ŝia bibliotekista kompetento. Post prezento de CDELI Claude Gacond informis pri la kreo de la asocio La

Amikoj de CDELI (Les Amis du CDELI), disponigante la statutan projekton. La dudeko da ĉeestantoj sin sekve reciproke prezentis kaj pro ĉeesto de Dieter Rooke, la reprezentanto de KCE, kiu ne komprenas la francan lingvon, Mireille Grosjean, la reprezentanto de SES, tradukis esperanten aŭ francen ĉiujn dirojn. Pluraj, kiuj tiel unuafoje aŭdis esperanton, esprimis sian intereson por la lingvo. Dum la aperitivo, kiu konkludis tiun amikan renkonton, vigle esprimiĝis la espero, ke kvankam emerita, Martine Schneller plue povos labori profite al la katalogado de la libraro de CDELI. La Amikoj de CDELI celos akiri monhelpojn kaj subvenciojn favore al la daŭrigo de la katalogado de la libroj slipigitaj, tasko temporaba.

Siaflanke la biblioteko havos la taskon mem katalogi la novajn librojn.

SAT en Svisio

Pro morto de Erna Döring la nova landa peranto de SAT en Svisio fariĝis Richard Schneller, Höhenstrasse 1 b, 9302 Kronbühl. Poŝtkonto 25-158577-1. rischneller@gmail.com. Li respondos ĉiujn viajn informetojn kaj ekde nun volonte akceptas vian jaran membrotizon: CHF 90.-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Venonta kunveno

Decembre 15 : Zamenhofa festo en Mulhouse, Francio.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Venonta kunveno

Decembre 15 : Zamenhofa vespero kun la laŭzananoj.

Kantono de Neuchâtel

La neŭŝatelaj lernantoj kantas en esperanto

Kadre de siaj finjaraj koncertoj la lernantoj de ĉiuj elementaj lernejoj de la neŭŝatela kantono kantas parton de la kristnaska kanto *Dolĉa nokt'* en esperanto. Tio do estos proksimume dumil lernantoj kaj ties instruistoj, kiuj estos en rekta kontakto kun esperanto. Tiu iniciato ŝuldiĝas plejparte al la juna svisa muzikisto Steve Muriset. Tio simbolas belan eniron en la jaro 2008, la jaro de la lingvoj.

La Chaux-de-Fonds Vesperaj kunvenoj ĉe CDELI

En via agendo nepre notu la datojn de la venontaj grupaj kunvenoj vesperaj: 2008 januare 9, februare 13, marte 11 kaj junio 11. Tiuj kunvenoj estas dediĉitaj al ĉiuj esperantistoj de la kantono de Neuchâtel dezirantaj plilertiĝi en la praktiko de esperanto per paroligaj ludoj, prelegetoj, diskutoj, legaj kaj festaj momentoj.

Ĉar vespere la enira pordo de la biblioteko estas ŝlosita, premu la sonorilan butonon de CDELI, kiu troviĝas dekstre de la norda enirpordo de la biblioteko kaj iu venos por liftigi vin al la CDELI-salono. Horaro: Alveno eblas ekde la 19.30. Grupa kunveno de la 20.00 ĝis la

21.30. Fermo de la salono je la 21.45.

Esperanto en Neuchâtel

En oktobro startis grupo esperanta en Neŭŝatelo. Ni estas universitataj gestudentoj, 4 junuloj kaj 4 junulinoj, kiuj renkontiĝas ĉiusemajne, normale ĵaŭdvespere ekde la 20a ĝis la 22a. Ĉiufoje la lernantoj studas iom da gramatiko, legas kaj klopodas diri bazajn frazojn. Ili trejniĝas por iri al la Internacia Seminario en Würzburg, ekde la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro (<http://ttt.esperanto.de/is>).

Kvar el ni ĵus partoprenis la studsabaton en CDELI, en La Chaux-de-Fonds, kiel ĉiam amuza kaj interesa. Se vi pasos tra Neŭŝatelo, jen la kontaktoj: Cesco Reale, Tel.: 076 2341843, cescoreale@gmail.com, skajpo: cescoreale2005.

PS Inter ni estas ankaŭ kvin goludantoj kaj tri frenezaj latinparolantoj! Se vi konas aliajn, bonvole igu ilin kontakti nin.

Cesco Reale.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

esperanto@isuisse.com

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20.00.

Venonta kunveno

Decembre 15: Zamenhofa festo kun la ĝenevanoj.

Raporto

Dum la septembra kunveno Francisko Randin perkomputile spektigis al dekkvino da ĉeestantoj kelkajn el siaj filmoj rete videblaj ĉe:

<http://www.youtube.com/DannirLsne>

Li poste instigis la interesatojn imagi kaj provludi rolojn por nova filmeto. Andres Bickel proponis kiel temon la fifaman ŝafan afiŝon. Do proponiĝis scenoj de kvereloj kaj bataloj pri fremduloj. Tio instigis la ludontojn multe paroli kaj inventi dialogojn. Post tiu cerbumado decid-iĝis realigi pli saĝan filmon kun dialogoj inter personoj diversnaciaj pri am-aferetoj kaj pri vizito de belaj laŭzanaj kvartaloj. Rete espereble baldaŭ malkovreblos tiu filmo.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venonta kunveno

2008 Januare 09 : ĉe Bellini :
14h00-16h00 : Konversacia rondo,
kun Sonja Brun.

Vespera ekskurso de la 10-a de aŭgusto

Agrabla promenado laŭlonge de la lucerna lago grupigis Koni Rey, Louise Bachmann, Renata Filali kaj M. kaj Paul Scherer. Tiuj kvin promenantoj kelkajn minutojn antaŭ la 18-a horo atingis IMAX kaj tiel povis spekti la filmon *Ursoj*, kiu interalie montras, ke iuj specoj de ursoj vivas en danĝeraj situacioj. Poste je la antaŭvidita 19a horo 15 la marŝantoj ĉe la restoracio Hermitage renkontis la busintojn Rosa Mettler kaj Annelies Dettling. Kaj ĉiuj kune ĝuis pri bona vespermanĝo en babila etoso iom krokodila ĝis la 22-a horo. Kaj dum la busa reveno ĉiuj esprimis siajn dankojn al Koni Rey, la organizinto de la vespera renkonto.

Paul Scherer

Wil

Esperanto-Klubo Wil

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : la unuan merkredon de la monato je la 19.00 en la Restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18 (piedire je kvin minutoj oriente de la stacidomo).

Zürich

Esperanto-Societo Zürich
Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-
Seefeld. Tel : 044 251 50 25
info@esperanto.ch.
Reto : www.esperanto.ch/zuriko

Venonta kunveno

2008 februare 7 je 18.00: Ĝenerala
Kunveno kaj Spagetumado :

Tagordo :

1. Protokolo de la lasta Ĝenerala
Kunveno.
2. Raporto de la estraro.
3. Raporto de la kastistino kaj de la
kaskontrolantoj.
4. Senŝarĝo de la estraro.
5. Elekto de la kaskontrolantoj.
6. Fikso de la kotizoj.
7. Buĝeto.
8. Decido pri proponoj.
9. Diversaĵoj.

Por la spagetumado en Esperantejo
(bonvolu aliĝi : kursoj@esperanto.ch
aŭ telephone 044 251 50 25 – kotizo
por la manĝo fr 15.- /membroj fr 12.-

Raporto

La Esperanto-Studsemajnfino de
Esperanto-Societo Zuriko, de la 14-a
ĝis 17-a de septembro 2007, pasis
sukcese kun ĉefe juna publiko. Oliva
Fischer gvidis la kurson por junuloj,
kiujn partoprenis 6 knabinoj de la
aĝo 10 ĝis 14. Ĉar Stefano Keller,
pro malsano en la familio, last-
momente ne povis veni, Dietrich
Weidmann transprenis la progres-

antan rondon, dum Nelida gvidis
intensivan kurson por komencantoj.
Eduard Binder ĝuigis nin per sia
kuirarto.


Etan aventuron ni travivis nokte,
ĉar la infaninoj jam iris dormi en la
domon N° 1806 dum la plen-
kreskuloj ankoraŭ babilis en domo
N° 1805. Subite la knabinoj aŭdis
bruon en la kelo kaj ektimegis. Ili
per movebla telefono vokis Nelidan,
kiu sendis sian edzon Dietrich por
kontrolo. Intertempe la knabinoj
armigis sin per polvosuĉilaj tuboj,
kuleregoj ktp. kaj kiam Dietrich en-
iris ilian domon, ili preskaŭ ekbatis
lin anstataŭ la fantomon, kiu kaŭzis
la bruon...

Nun malaperis la noktaj fantomoj
kaj belega aŭtuna dimanĉo invitis
nin al migrado en Laui. Ni tie pasis
belegan tagon en la naturo, kiu post
kolbasumado kulminis en ĉeval-
ĉarveturado al la piedo de Sentiso.

Dietrich Weidmann

Donaco de la Svisa Enciklopedio

En la Universala Kongreso en
Jokohama Dietrich Weidmann
donacis nome de SES kaj ESZ tri
ekzemplerojn de la Svisa Enciklo-
pedio al Japana Esperanto-Instituto.
Tiel la verko en la biblioteko de la
Japana Esperanto-Instituto estas nun
je dispono de la esploristoj. Dietrich
Weidmann prenis tiujn librojn el sia
aĉetita stoko, do tiel subvenciis la
agadon.



Kongresen

Ĉu vi konas Szczecinon? André Sandoz

Post unu semajno en la pola urbo Pelplin, kie okazis la 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso de kune IKUE kaj KELI (katolika kaj protestanta asocioj), mi trajne veturis okcidenten al Ŝĉecino, kie atendis min Hanna.


Hanna estas pola korespondantino, kiun mi gastigis antaŭ du jaroj en La Chaux-de-Fonds. Ĉi-jare estos mi ŝia gasto. Ŝi skribis, ke ŝi antaŭgigas revidi min, paroli esperante kaj prezenti al mi la urbon, en kiu ŝi naskiĝis kaj kiun ŝi neniam forlasis.

Kiel promesite, Hanna atendas min sur la pasaĝer-kajo. Ekal ŝia loĝejo, placo Grunwaldzki. Komenciĝas mia elkovro de Ŝĉecino (pole: Szczecin, prononcu Ŝĉecin), koncentraĵo de 420'000 poloj, nur poloj. Vi ne vidis tie nigrulon aŭ azianon. Nur poloj parolante nur la polan. Do, preskaŭ, ĉar en difinitaj stratoj promenadas homoj, kiuj tenas enmane urboplanon, parolas inter si germane kaj havas dorso-sakon.

Hanna malŝatas mian tornistran kaj proponas al mi, ke mi lasu ĝin hejme. Mia rulvalizo longe memoros pri Ŝĉecino: la stratoj estas krude pavimitaj kaj la trotuaroj slabitaj

diversmaniere per slavoĝranitaj ĝis unu metro larĝaj. El kiu malproksima montaro devenas tiuj rimarkindaj ŝtonoj?

Ne malpli impresaj estas la tramoj. Ĉie-estaj, efikaj kvankam malnovaj, veturante bruege sur larĝegaj fervojoj apud aŭ inter la stratoj ili bildas, kun busoj, bonegan reton de publika transportigado. Senkosta por mi dank'al mia aĝo. Ni multe uzos ilin.




La kastelo de la pomeraniaj dukoj

La placo (pole: Plac) Grunwaldzki ne estas placo, sed granda ronda parko publika, sur kiu kuradas infanoj kaj ŝakludas maljunuloj ĉe tabloj. Ok stratoj konverĝas al tiu verda insulo, neniuj transiras ĝin. Nur unu tramvojo tion rajtas. La loĝejo de Hanna superas la parkon, de la 7-a etaĝo de domo rekonstruita post la dua mondmilito.

Observi la urbon de supre. Tion mi faros plurfoje. Unuafoje el

restoracio luksa ĉe pinto de nova komerca turo. Duafoje kaj triafoje el balkonetoj vertiĝaj, kaj el la ĉefturo en la fama kastelo de la pomeriaj dukoj, kaj el la centra tegmenta pinto de la nacia ŝipa muzeo. Ambaŭ belvederoj atingitaj pere de senfina spirala ŝtuparo.

Mi miras pri tio, ke tia havena urbo konstruita je 65 km de la Balta Maro kapablas gastigi tiom multe da ŝipoj. Oni ja vidas kelkajn ŝipojn sur la rivero Odro, sed ĉefe, ĝis nevidebleco, elmeriĝas mastaroj el la arbaroj, kiuj kovras la enfluejan regionon. Kanaloj kaj lagoj nevideblas!



La nova katedrala turpinto pretas

La urbo prizorgas sian bildon. Oni urboplanas, konstruas moderne kaj futurece. Ĉiu polo ja scias, ke lia lando kunorganizos Eŭrofutbalon en 2012. Oni ankaŭ talente kaj malavare renovigas malnovajn famajn konstruaĵojn.

La turpinta metala skeleto, kiun mi vidis en aŭgusto kuŝanta apud la katedralo certe fariĝis fiera nova spajro. Ĝi devas anstataŭi la obtuzan kvarangulan tegmenton, kiu kovris la turon depost la unua mndmilito ĝis la nuna jaro.

Hanna ne tre ŝatas historion. Ŝajnas al mi, ke ŝi pli kultivas devon

de forgeso, ol devon de memoro, ŝi kaj ankaŭ ŝiaj kunlandanoj. Sed forviŝi memoron de eventoj ne signifas forviŝi memoron al forpasintoj.

La centran tombejon de Ŝĉecino oni nepre devas viziti. Ĝi kovras 153 hektarojn, tio egalas dufoje nian ĵurasan lagon de Les Brenets. Ĝi estas grandega parko relative vivplena, sur kies aleoj bicikle veturas gardistoj. Kies familio posedas sufiĉe grandan parcelon, tiu disponas privatan benketon, sur kiu ĝiaj anoj rajtas longtempe sidadi, kiam ili vizitas siajn mortintojn.

Hanna diras, ke ŝi kutimas veni en la tombejon du-tri-foje jare kun amikinoj. Ĉiu vizitas sola siajn tombojn, sed difiniĝas rendezuo por iri poste ĉe unu el la amikinoj, kie okazas tetrinkado kaj rakontado pri la forpasintoj.

Min impresas momente la arboj, pli ol la nenombreblaj tomboj kaj monumentoj. Hanna rigardas konsternite sian akompananton, kiu naz-al-ĉiele laŭiras vicojn da tomboj, mirante pri grandiozaj serbaj piceoj, amerikaj kverkoj, japanaj nukсарboj kaj ĉiaspeciaj indiĝenaj arboj. Vere ĝardeno botanika. La trilingva urba varbilo pravis.

André Sandoz

Travivaĵoj en Japanio Somero 2007

Mireille Grosjean

Mi restadis dum 5 semajnoj en Japanio en julio kaj aŭgusto 2007. Estis mia dua japana vojaĝo. La unua estis kun mia tuta familio en

1985, niaj filinoj tiam aĝis 9 kaj 7 jarojn.



Mia vojaĝo 2007-a konsistis el 3 partoj :

1. Trisemajna rondirado kun mia dua filino Joëlle.
2. Universala Kongreso en Jokohamo.
3. «*Bonvenon al Oomoto 2007*» kvartaga restado en Ajabe.

Ni alvenis al Kansai Flughaveno apud Kioto. Ni estis invititaj en 6 familioj, 5 esperantistaj, unu ne: temis pri iama lernantino mia, kiu nun vivas en Japanio. Do grandparte ni uzis esperanton. Niaj amikoj akompanis nin en vizitado de kasteloj, ĝardenoj, temploj. Ni iris ĝis Hiroshima kaj revenis al Tokio. Belega lando!! Afabla popolo, amikaj kaj gastigemaj esperantistoj.

Dum la Universala Kongreso mi laboradis kiel kutime: mi kunvenis kun la komitato; mi trapasigis la ekzamenojn kaj mi reĝisoris la Internacian Artan Vesperon. Do mi havis neniun eblon aŭdi iun prelegon. Dum la komitato estis elektoj: ni havas novan prezidanton, Probal Dasgupta el Barato, denove azian

post Lee Chong Yeong el Koreio antaŭ nelonge. Nova estraro estis elektita; pri tio vi certe legis en la revuo *Esperanto*. La laborklimato estis bona.

En la ekzamenoj kandidatiĝis tri personoj por la elementa nivelo. La sesio komenciĝis la 6an de aŭgusto. Dekokjara kandidatino el Italio raportis, ke ŝi komencis la studon de Esperanto en la aviadilo venante al Japanio la 29an de julio. Kaj ŝi sukcesis en la ekzameno!! Nekredeble!!

Por Internacia Arta Vespero mi devis aŭskulti plurajn prezentojn kaj decidi. Malfacila tasko... Mi devis ankaŭ pensi pri la belega salono Zamenhof, halo Minato Mirai, kie la Vespero okazis: la programeroj devis esti je la nivelo de tiu mirinda loko.

Japanoj avertis min: Oomoto estas sekto ŝintoisma. Do mi prudente observis. Tamen Oomotanoj intervjuis min, petis de mi, ke mi alparolu la publikon fine de Uta-festo kaj ofertis al mi laborpostenon: en Esperanto Populariga Asocio (EPA) estas seĝo por ne-japano kaj nuntempe tiu seĝo vakas. Do ĝi povus esti por mi... Nekredebla fido! Oomoto en Ajabe havas belegajn lokojn, ĝardenojn, templojn. Mi sentis min tre bone. Ni povis detale diskuti, ĉu kun Oomotanoj, ĉu inter la partoprenantoj (pli ol 60 personoj el la tuta mondo). Mi povis kompreni, kio difencas inter Oomoto kaj ŝintoismo. Mi povis praktiki aikidon, ŝodon (kaligrafio), ktp.

Dum la Universala Kongreso mi renkontiĝis denove kun Jamasaki

Seko, tradukisto-verkisto. Li deĵoris ĉe giĉedo, tute simple. Dum „Bonvenon al Oomoto 2007“ mi longe diskutis kun Huĝimoto Tacuo, tradukisto-verkisto. Estas enorma ŝanco renkontiĝi kun tiaj homoj kaj havi kontaktojn.

Mi tranoktis en 10 malsamaj litoj; nur unu estis hotela lito. La aliaj estis en la familioj. La hotela lito estis en Jokohamo dum la UK.

En 1985 ni nenion sciis pri Esperanto. Ni vidis, vizitis, trairis la landon. En 2007 danke al Esperanto ni povis starigi demandojn, paroli, aŭdi klarigojn, ricevi sciigojn, havi kontaktojn rektajn, loĝi en la familioj. Ni vidis plurajn domojn malsamajn. Ni manĝis plurajn pladojn malsamajn. Ni multon eksciis pri la kulturo, pri la tradicio, pri moderna Japanio kaj ties malfacilaĵoj kaj eseroj.

Nun mi devas instrui en Le Locle ĝis mia emeritiĝo en julio 2008. Poste mi reiros al Japanio, ĉar mi amegas tiun landon.

Mireille Grosjean

Somere en Bulgario

Bruno Graf

Kun hezitoj mi decidis esperantumi somere en Bulgario. La varmego, la malfacileco legi la kirilan skribon, sed esperantistoj ja povas helpi. Tio estas nia avantaĝo.

Surteriĝante en Sofia mi ekvidis la montojn ĉirkaŭe, kiel en Svislando, estas tie ĉirkaŭ 500 m super la maro. Mi miris pri la nova flughaveno, kie trairis nur malmultaj homoj kaj provis havigi bulgaran monon el

aŭtomato, sed ĝi ne ankoraŭ funkciis. Taksiisto veturigis min al hotelo, kie mi poste konstatis, ke li trompis min.

Sofia havas imponan centron, kiu forte kontrastas kun la kamparo, kie okulfrapas nefinitaj malbelaj domoj. Tamen oni rimarkas la ekonomian progreson. Estas beno, ke Bulgario eniris la Eŭropan Union, kiu subvencias la plibonigon de la infrastrukturo. Ne multas almozuoj. Policistoj apenaŭ videblas. La homoj ne komprenas la anglan lingvon, neis, kiam mi alparolis ilin. Indas viziti la ĉefurbon, kie plej impresis min la katedralo Aleksandar Nevski, konstruita memore al la liberiĝo el turkoj.

La kaŭzo somerumi en Bulgario estis la Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK = Organiza societo de internaciaj esperanto-konferencoj. Ĝia celo estas prezenti prelegojn kaj diskuti ilin en etoso de amikeco kaj reciproka respekto. Alia grava tasko estas atribui jare la OSIEK-premion por literatura verko. La premio sumas 600 eŭrojn, pagita el la membrotizoj. La nivelo de la prelegoj kaj la lingva kapableco de la partoprenantoj estas rimarkinde bonaj.

La ĉijara konferenco okazis 14-20 julio en Pazarĝik, provinca urbeto 100 km oriente de Sofia kun 30 personoj. Estas agrabla loko kun aleoj, urbeto de artistoj. Allogas muzeoj kaj galerioj, La teatro estas fermita somere. Georgi Mihalkov el Sofia organizis la konferencon helpe de loka teamo. Li estas konata ese-

isto kaj verkas sub la nomo Julian Modest.

La temaro estis Mitoj kaj Legendoj. La Armea Kulturdomo servis por inaŭguri la konferencon, kie kantis la Virina Esperanto-Koruso de la urbeto. Aktivitas tie ankaŭ esperanto-grupo. Ed Borsboom, prezidanto de OSIEK, gvidis la debatojn kun humuro. Bulgaraj prelegantoj kune kun iuj de najbaraj landoj desegnis mozaikon de legendoj kaj mitoj, kiuj fascinas kaj ofte strangas. Pri legendoj oni diskutas, pri mitoj oni disputas, ĉar ili vekas emociojn. Spertaj eksterlandaj prelegantoj estis David Kelso el Skotlando kaj Abel Montagut el Hispanio.

Antaŭtagmeze prelegoj en la hotelsalono, posttagmeze vizitoj de muzeoj, galerioj kaj preĝejoj. Iom tro ofte, pro la varmo. Tiel mi testis la delegitan reton de UEA kaj ĝi surprize funkciis. Fani Mihajlova, delegito en la urbo Plovdiv kondukis grupeton tra la pitoreska malnova urbo. Ne plenumitaj restis kelkaj planitaj eroj kiel vizito de vinkelo, de minerala baseno, de groto, bedaŭrinde.

Je la fino la asembleo voĉdonis pri la OSIEK-premio, kiu iris al Jak Le Puil kaj Armelle LeQuint pro la traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* de Céline.

Bruno Graf

Morto

Erna Döring

1920 – 2007

Erna Döring naskiĝis en Bazelo la 13-an de majo 1920. Ŝia patro estis germana, ŝia patrino svisa. En februaro 1921 la familio translokiĝis al Dresden. Tiam la patrino fariĝis esperantistino. Ŝi ofte havis gastojn kaj Erna rajtis veki ilin en esperanto. Tial ŝi renkontiĝis kun infanoj, kiuj ankaŭ parolis tiun lingvon kaj nature ŝi deziris lerni ĝin. En 1926 ŝi rajtis partopreni kurson.

En 1929, pro malsano de la avo, kiu havis entreprenon en Bazelo, la familio neatendite revenis al Bazelo. Tiam kontakto kun esperanto ne tuj okazis, sed Erna ĉiam anoncis, ke kiam ŝi estos plenkreska, tiam ŝi

relernos tiun lingvon. Ŝi iris al la lernejo kaj poste laboris en diversaj metioj.

Tamen en 1966, ŝia patrino legis anoncon pri la tiama Esperanto-Grupo kaj Erna kontaktis ĝin. Tiel ŝi konatiĝis kun Kurt kaj Hildegard Schweizer, Hermann kaj Jeanne Schmutz, Heinrich Ringli kaj Hans-Werner Grossmann. Dank'al korespondado ŝi rapide lernis. Jam du jarojn poste ŝi fariĝis sekretario de la grupo. Tiam ŝi partoprenis fervojistan kongreson kaj ekde 1982 SAT-kongresojn.

En 1976 ŝi transprenis la gvidon de la bazela Esperanto-Grupo kaj ankaŭ fariĝis esperanto-instruanto.

Ŝi esence kontribuis al la firmigo de la esperanto-movado en Bazelo.



En 1975 ŝi transprenis la tajpadon kaj administradon de la *Migranto* Okaze de la jarkunveno de TANEF en 1976 ŝi estis elektita kiel internacia-fakreferanto (1976-1996) kaj proponita al la Naturamika Internacia, kie ŝi dum la sekva jara kunveno estis agnoskita kiel internacia fakreferanto por esperanto. Dum tiu tempo 1976-1996 ŝi ankaŭ kunlaboris al la pretigo de butonoj por vestaĵoj, de glu-insignoj por aŭtomobiloj, de T-ĉemizo, ktp. Kaj ŝi estis LKK-kunlaboranto de la 64-a UK en Lucerno en 1979.

Erna Döring fondis la TANEF-grupon en Bazelo, organizis ekskursojn, feriajn semajnojn kaj unufoje jare tusvisan migradon.

En 1981 ŝi organizis la SAT-Kongreson en Bazelo kun David Bühlmann, Maŭro de Sassi, Alice

Kessler kaj Jimmy Rivière. Sekvis postkongresa semajno en Lucerno.

En 1981 ŝi fondis kaj ĝis 1989 redaktoris kluban organon *Kuriero de Esperanto*. Sindone ŝi organizis multajn esperanto-aranĝojn lokajn, naciajn, trilandajn kaj internaciajn.

En 1982 si emeritiĝis de la medicina eldonejo, kie ŝi laboris. Pro la centjariĝo de esperanto, en 1987, kunlabore kun Claude Gacond ĉe KCE, ŝi aranĝis ekspozicion pri *Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando* en la bazela universitata biblioteko. En somero 2006 ŝi devis resti sufiĉe longe en malsanulejo kaj ĉar ŝi ne pli havis tiel multe da fortoj, ŝi ne pli povis vivi sola kaj fine de la jaro 2006 ŝi translokiĝis al maljunulejo, ĉiam en sia kvartalo.

Mirinda estis, ke pro Esperanto kaj kvankam ŝi ne plu estis tiel juna, ŝi aĉeti ankoraŭ notebook por povi labori por esperanto. Bedaŭrinde la hospitalo tiam ne estis preta akcepti, ke malsanaj personoj uzu la reton. Ankaŭ en tiu kampo ŝi estis pionira.

Kiel vi konstatas: multe da aktivecoj poresperantaj en Svislando kaj ankaŭ mondscale ni ŝuldas al ŝi.

Ŝi estis longe peranto de SAT kaj de TANEF kaj kunredaktoro de la *Migranto* kaj de *Sudrejna Kuriero*, kiu anstataŭis la lokan bultenon *Kuriero de Esperanto*.

En Aprilo 2005 Erna Döring fariĝis Honora membro de SES.

Nicole Bérout-Focke

*Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9302
Kronbühl,rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la
aŭtoroj mem.*

Aktuala lingvodebato en Svislando

• *Andreas Künzli*

*Nova lingvoleĝo de Svislando
malfermos al la angla lingvo
ankoraŭ pli vaste la pordojn.*

Nova lingvokverelo, kiu minacis Svislandon, estis lastminute solvita komence de oktobro 2007 fare de la svisa parlamento. La proceduro estis unika: Kvankam la svisa registaro volis flankenmeti la aferon en 2004, ellaborinta propran leĝon, la parlamento, surbaze de iniciativo de nacia konsilisto Christian Levrat (SP/FR), postulis reokupiĝi pri la lingvoleĝo, do la Kleriga Komisiono de la Nacia Konsilio ellaboris propran proponon, kiu formas la bazon de la aktuala lingvoleĝo. Ŝajnas, ke la atento pri lingvaj demandoj sur plej alta politika nivelo (t. e. registara) en Svislando iĝis pli malforta sub la valeza liberaldemokrata registarano Pascal Couchepin kompare kun lia antaŭa socialdemokrata

kolegino Ruth Dreyfuss, judino el Ĝenevo, ambaŭ franclingvanoj.

Fakte jam pli ol dudek jarojn la svisa parlamento traktadas la lingvan demandon. Sed multaj punktoj en ĝi estis kontestataj kaj neklaraj: disdivido de la kompetencoj, kostoj kaj instruado de la angla lingvo. Pasis dek jaroj, ĝis kiam la popolo en 1996 akceptis la koncernan artikolon de la konstitucio. Pliaj dek jaroj pasis por la konkretigo de la leĝo.

Diverĝaj politikaj sintenoj

Pro diverĝaj ideologiaj kaj pragmataj vidpunktoj okazis interesa kunpuŝiĝo inter la diversaj politikaj interesfortoj. La decido de la Nacia Konsilio (granda ĉambro de la svisa parlamento) en junio 2007, ke en svisaj lernejoj la unua instruata fremdlingvo estu unu el la naciaj lingvoj, respegulis la sintenon de la plimulto de la konsilianoj (precipe Svisa Popolpartio kaj Socialdemokrata Partio) kun la celo gardi la nacian

koherecon inter lingvoj kaj regionoj de Svislando kaj konservi la kulturajn valorojn de la lando. Tio provokis kontraŭstaron flanke de la kantonaj registaroj kaj de la Konsilio de Kantonoj (malgranda ĉambro). La kantonoj favoras la instruadon de du fremdlingvoj en la baza lernejo, sed prenas al si la rajton mem decidi la sinsekvon de ilia enkonduko; konkrete: ĉu unue estu instruata dua nacia lingvo (kiel la germana, franca aŭ itala) aŭ alia fremdlingvo – diru la *angla lingvo*. Temas nur pri tio. Multaj kantonoj en germanlingva Svislando fakte jam decidis: Unue estu la angla lingvo (tiel nomata Frühenglisch), poste sekvu alia nacia lingvo. Tiu reguligo koincidas ankaŭ kun la sinteno de la Kantona Konferenco de Eduk-direktoroj.

La parlamenta traktado komplikigis pro la (fakte ne tiom surpriza) sinteno de la Konsilio de Kantonoj, kiu fine de septembro opiniis, ke la devigo al dua nacia lingvo en la fremdlingva instruado estus „kontraŭkonstitucia“ kaj „senrespondeca“. Nekutima tono, oni povus kredi. Nu, laŭ artikolo 18 de la Svisa Konstitucio (plej nova versio de la 18a de aprilo 1999 resp. 8a de aŭgusto 2006) „la lingva libereco estas garantiata“. Nenia preskribo do kiu el la lingvoj estu unue instruata. Des pli ĉar en la praktiko la angla

lingvo kiel unue instruata fremdlingvo ege progresis en multaj kantonoj, kiuj estas reprezentataj de la malgranda parlamenta ĉambro, kaj ĝia enkonduko voris enormajn kostojn. La nova lingvo-leĝo antaŭvidas kostojn en alteco de 15 milionoj da svisaj frankoj.

La fama helveta kompromiso

Post tiu kontraŭdira debato la nova leĝo estis akceptita de la svisa parlamento komence de oktobro 2007 surbaze de kompromisa formulo: Laŭ la decido de ambaŭ ĉambroj, la Svisa Konfederacio kaj ties kantonoj favoras koncepton pri fremdlingva instruado, kiu post la fino de la deviga lernejo garantiu egalnivelajn lingvajn kompetencojn de la lernintoj en du fremdlingvoj, sendepende de tio, kiu fremdlingvo estis unue instruata.

Ĉi tiu formulo apogas sin sur la Konkordato de la Kantonoj pri harmoniigo de la lernejo (HarmoS). La Nacia Konsilantaro postulis, ke la instruado en la naciaj lingvoj okazu respekte al la kulturaj dimensioj de plurlingva lando. Samtempe ĝi silente akceptis la klaŭzon pri federalisma aldona sekurigo, garantiata de la Konsilantaro de la Kantonoj. La ĉi-lasto postulis ankaŭ, ke Federacio kaj kantonoj „engaĝiĝu kadre de siaj kompetencoj“. Tio signifas en la praktiko ankaŭ dis-

dividon de la lingvo-taskoj sur ŝtata kaj landa niveloj, nome ke en la Federacia Administrejo estu favorata la aplikado de la (kvar) naciaj lingvoj (inkluzive de la romanĉa), dum en la kantonoj, kiuj estas suverenaj pri lingvopolitiko, povas esti donita la prefero al la instruado de aliaj fremdlingvoj (kiel precipe la angla).

Estis ankaŭ dirite, ke kadre de la nova leĝo la Federacio povas subteni la interŝanĝon de lernantoj kaj krei kompetencan centron por favori la aplikon de la multlingveco.

Ĉu la angla venkis?

Per tiu formulo povis esti malhelpata nova longdaŭra kverelo pri lingvaj aferoj aŭ evitata referendumo el la kantonoj. La gazeto *Neue Zürcher Zeitung* (26.9.) bonvenigis la rifuzon de federacia dikto pri lingvolernado, ĉar ĉio alia ne kongruus kun la realeco en Svislando.

Ŝajnas, ke granda parto de la (alemanaj) svisoj favoras la angla-lingvan opcion, kiel eblas konstati en enketo lanĉita de la Svisa Televido. Laŭ la (nedevegaj) rezultoj, 51% favorus la anglan, 38% la francan kaj 11% opinias, ke la kantonoj mem decidu.

Koncerne la anglan lingvon estas klare, ke la nova svisa lingvoleĝo permesos al ĝi novajn perspektivojn en kantonoj, se ili

decidos, ke la angla estu unue instruata en la baza lernejo. Sendube malbona novaĵo por Esperanto, por kiu la angla lingvo kiel „konkurento“ fariĝos ankoraŭ pli potenca. Cetere la ĉefo de la parlamenta frakcio de la Liberaldemokrata Partio, Felix Gutzwiller, starigis en la parlamento eĉ la demandon, ĉu la angla fariĝu la kvara oficiala lingvo en Svislando apud la germana, franca kaj itala por povi publikigi ĉiujn leĝojn ankaŭ en la angla lingvo. Per tio li kredas, ke Svislando kiel ekonomia, kultura, scienca kaj turisma loko povus internacie fariĝi pli alloga. Ke tia ideo estus malbona, kredas Thomas Daum, la direktoro de la Labordunga Asocio; li reagis per skeptiko al tia sugesto, donante la preferon tamen al la flegado de la oficialaj lingvoj de Svislando. Sed por ke turistoj kaj eksterlandaj laboristoj kaj dungitoj pli bone komprenu, la svisa televido rezignu pri la uzado de la alemanaj dialektoj!

Jen tiom pri la aktuala lingvodebato en Svislando.

Pliajn resursojn pri tiu temo troveblas :

www.planlingvoj.ch/sprachpolitik.htm

Du libroj por lerni la romanĉan

• *Nicole Margot*

Ĝis nun ekzistis neniu lernolibro por franclingvanoj kiuj volis lerni la romanĉan. Ili estis devigataj uzi alilingvajn gvidilojn.

Por multaj legantoj la plurkultureco de Svislando, kiu posedas kvar naciajn lingvojn, la germanan, la francan, la italan kaj la romanĉan, estas aparte interesa pro la 26-kantona federacia strukturo de tiu lando, kiu sufiĉe harmonie donas ekvilibran lokon al ĉiuj lingvaj regionoj. Tamen tiu idealo foje renkontas limojn. Svislando ja estas oficiale plurlingva kaj tiu plurlingveco estas respektata en multaj kazoj, sed kiel konate regas granda ignoro de svisoj pri alies samlandaj kulturoj, ĉefe kiam ĝi malplimultas. Ekzemple oni nun diskutadas en Germanio kaj en Romandio¹ pri la unua lingvo lernota en la lernejo, ĉu iu nacia lingvo, ĉu la angla? Sed tiuj du plej grandaj lingvaj regionoj, kiam ili parolas pri nacia lingvo, parolas nur pri la germana aŭ la franca. La instruado de la itala pli kaj pli malkreskas en Romandio, kaj proponi lernejan studon de la romanĉa ekster la grizona kantono (kie ĝi estas unu la el tri lingvoj, apud la germana

kaj la itala) estus konsiderata kiel ŝerco. Ofte oni disigas svisajn kulturojn en du partojn: alemanajn kaj latinidajn. Sed ankaŭ tio ne respondas al la realo, iuflanke ĉar alemana kulturo ne tiom unuecas ol kredas romandoj, due ĉar ne ekzistas tiom da solidareco, en la voĉdonaj elektoj ekzemple, inter romandoj kaj iliaj orientaj latinidaj fratoj (romanĉ- kaj italparolantoj). Plej ofte grizonaj politikistoj estas konsiderataj kiel alemanoj eĉ kiam ili parolas latinidan lingvon kiel la romanĉan.

Same kiel romandoj, por rapide veturi al Grizono, devas vojaĝi nordorienten ĝis Zuriko (Germanio) kaj reveni suden (dum ili pli malpli samlatitudo situas) kaŭze de la alpa barilo, tiuj romandoj ĝis nun bezonis la germanan lingvon por studi la romanĉan, kvankam tiu lasta pli facile kompreniĝas por ili ol la germana. Kvankam la romanĉa estas latinida, ĝis ne longe mankis gramatiko de la romanĉa lingvo por francparolantoj. Eĉ vortaroj romanĉaj-francaj preskaŭ ne ekzistas. En 2001 aperis bonega vortaro romanĉa-sursilva (unu el la variantoj de la romanĉa²) pri kiu raportis *Etnismo* (n-ro 71, p. 10) sed neniam ĝis nun aperis la alia direkto franca-sursilva. En 1990 usonano verkis

vortaron ladina-francan (alia vari-
anto de la romanĉa²) kaj inverse.
Kaj neniuj vortaro ekzistas por la
francparolantoj pri la grizona ro-
manĉa (*rumantsch grischun*), la
superregiona lingvo, kiun la svisa
popolo oficialigis en 1996, krom
minivortaro verkita ĝuste de la
aŭtoro, kiu finverkis tiun jaron la
libron pri kiu ni volas nun paroli.

Parolu romanĉe

“*Parlons Romanche, la qua-
trième langue officielle de la
Suisse*” de *Dominique Stich* aperis
je la eldonejo *L’Harmattan* ko-
mence de tiu jaro. Ne unuan fojon
ni parolas pri la lingvisto *Do-
minique Stich*³ en la paĝoj de
Etnismo. Efektive en la sama serio
de *L’Harmattan* (kie ankaŭ aperis
“*Parlons Espéranto*”) *Dominique
Stich* verkis “*Parlons franco-
provençal*”, proponante la unuan
superdialektan ortografion por la
francprovenca/arpitana lingvo¹.
Tiu franc-svisa lingvisto fariĝis
fakulo pri svisaj lingvoj ĉar en
2002 li ankaŭ proponis je la sama
eldonejo “*Parlons Schwytzer-
tütsch*”.

Blue vestita la libro “Ni parolu
romanĉe” montras la grizonan
standardon, kiu kunigas la tri gri-
zonajn ligojn, maldekstre la nigra-
blankan blazonon de la Griza
Ligo, dekstre la blu-flavan krucon
de la Dek Juridikcioj kun sube la
virkapron de la Ligo Domo-Dio.

Tiuj tri ligoj “estis unuafoje unu-
ecigitaj en 1803”, je la kreo de la
kantono. Dorsoflanke ni eklernas,
ke “*Dominique Stich* estas doktoro
en lingvistiko, diplomita de *l’Uni-
versité Paris V René Descartes* en
Sorbono. De alemana patro kaj
franca patrino li vivis en Svis-
lando, en Belgio kaj en Francio
kaj emas konigi al francoj kaj
franclingvanoj lingvojn, ofte ne
konatajn de Svislando...”



Je la unuaj paĝoj ni trovas
novan subtitolon, kiu avertas, ke
la aŭtoro parolos pri “la grizona
romanĉa kaj la romanĉaj vari-
antoj²”.

Ni malfermu la libron

En ok paĝoj la unua ĉapitro rapide skizas la geografian, politikan kaj lingvan situacion de Svislando por pli bone situigi la plej grandan sed malpli loĝatan kantonon de Svislando: Grizono. Ĉar la libro adresiĝas al francparolantoj la klarigoj plejofte referencas al la franca lingvo, kaj ni povas legi interalie ke, dum la franca lingvo uzas la daŭfenidevenan vorton *-mélèze-* por la alpa arbo *-lariko-* estas la latina vorto *-larix-* (gen.*-laricis-*), verŝajne de pli fora origino alp-kelta, kiu donis la terminon en ĉiuj svisaj lingvoj: la alemanoj uzas la germanan vorton : *-Lärche-*, en la francprovenca/arpitana¹⁾ *-larze-*, la italparolantoj *-larice-* kaj la romanĉoj *-laresch-*. Oni ankaŭ miras lerni, ke la grizonaj civitanoj longe kontraŭstaris aŭtomobilan veturadon, kaj ke nur en 1927 la montara strataro estis komplete malfermita al aŭtomobilantoj.

En la dua ĉapitro la aŭtoro priskribas la lingvon, ĝian originon, ĝiajn variantojn. En tiu ĉapitro ni trovas interesajn difinojn, ekzemple: “la diferencon inter la nocioj de “koineo” kaj “super-dialekta grafio”, “kio estas lingvo?” Pri tiu lasta demando ni povas legi ke, por diferencigi lingvon de dialekto aŭ ĵargono, “ekzistas neniu lin-

gvistika difino pri kio estas lingvo”. “La difino pri lingvo estas socia. Estas komunumo, povo, ŝtato, kiu decidas ĉu iu lingvaĵo estas lingvo, oficiala aŭ ne, aŭ dialekto, pli malpli arbitre kunligebla al iu lingvo”. La plej granda parto de la informoj pri la romanĉa venas el prelego farita de *Guiu Sobiela-Caanitz*⁴ en *Yvoire* en 2006. En tiu ĉapitro oni trovas ankaŭ du paĝojn pri la lingva situacio de Grizono, trilingva kanton (romanĉa, itala, germana).

Per la tria ĉapitro ni eniras en la pli teknikan aspekton de la lingvo: “Ortografio kaj fonetiko”, iuspeca enkonduko al la sekva ĉapitro, kiu traktos la “fonetikan evoluon”. Tiu lasta, kiu konkrete montras la evoluon de la fonemoj ekde la latina lingvo, postulas fortan atenton de iu leganto ne tre alkutimiĝinta kun lingvistiko, sed la aŭtoro bone difinas bazajn lingvistikajn konojn, kiel -fonemon-, kiel la diversajn akcentojn lastajn, antaŭlastajn kun barbaraj nomoj: oksitono- kaj -paroksitono- kaj proparoksitono-, kiel -palatigojn-, velarigojn- ktp.

Sed certe se oni kroĉiĝas al tiu malfacila ĉapitro, oni komprenas multon pri la romanĉa sed ankaŭ pri la evoluo de la latinidaj lingvoj ĝenerale. Estas interese aldoni, ke se la aŭtoro ĉefe okupiĝas pri la grizona-romanĉa, je ĉiuj paĝoj de

tiu ĉapitro kaj de la tuta libro oni trovas piednote la ekivalenton en la *vallader* (V), la *puter* (P), la *sutsilvan* (T), la *surmiran* (M), kaj la *sursilvan* (S)².

La esperantistoj aparte ĝuos komence de la ĉapitro 5, “la principoj de la grizona romanĉa”, vidi enkadritaĵon kun la demando: “Ĉu la kulturaj lingvoj estas tiom naturaj?” Male respondas Doninique Stich, la italan konstruis *Dante*, la germana venas el la traduko de la Biblio fare de *Luther* kaj “la franca estas la kortega lingvo, iom post iom fariĝinta tiu de la nobeloj, kiuj senĉese riĉigis, eltranĉis, transformis laŭ ideala rigardo pri kio devas esti -bela elparolado.”. Kaj la grizona romanĉa ne estas pli artefarita ol ili, konstituita 99,99% de la idiomoj kaj variantoj romanĉaj.

La grizona romanĉa “estas lingvo de kompromiso. La kreanto, *Heinrich Schmid*, ĉefe baziĝis sur la sursilvana², la surmirana² kaj la valadera². La lingvo “konstruiĝis laŭ principo de la plejmulto, prenante se eble skribitan formon komunan al la tri bazaj variantoj. Tiu principo same validas por la parto fonetika kaj gramatika kiel por la frazkonstruo kaj la vortaro”. Kiam tiu principo ne eblis, oni uzis la plej oftan formon aŭ konsideris ankaŭ aliajn variantojn. La aŭtoro de tiu lingvo ankaŭ simpligis la fonetikon kaj iom raciigis la gra-

matikon. Kompreneble tiu superregiona formo ne povis plaĉi al ĉiuj sed ĝi ebligis la oficialigon de la romanĉa.

Sekvas longa ĉapitro pri la gramatiko, kiun mi lasas vin malkovri, ĉiam kun piednotoj koncerne la lokajn variantojn.

Tripaĝa ĉapitro rapide traktas la toponimojn.

“Pripensoj pri la grizona romanĉa” interese montras la avantaĝojn de tiu superdialekta lingvo, kaj la aŭtoro demandas sin kial superregiona lingvo kaj ne superregiona ortografio, kiel li mem proponis por la francprovenca/arpitana³. Kelkaj simplaj frazoj kun la akcentita vokalo grasigita, same kiel por la dudirekta leksiko je la lastaj paĝoj, kiu sekvos. Skribitaj tekstoj en ĉiuj variantoj kun franca traduko kaj komentoj ĵus antaŭas en la 10-a ĉapitro: Preĝo al Nia Patro, legendo pri la korvo kaj la vulpo kaj kelklinia artikolo pri la “trilingva kantono”.

Tiu verko estas tre pozitiva evento por franclingvanoj kaj ĉefe por romandoj, sed kurioze, laŭ mia scio neniu romanda gazeto parolis pri ĝi. Profunda indiferenteco, aŭ strategia eraro de la eldonejo, kiu ne sufiĉe sendis presekzemplerojn en Romandion? La sola romanda ĵurnalisto, kiu ricevis ĝin, rifuzis ĝin komenti en gazeto obĵetante, ke tiu libro tro parolas pri lingvistiko kaj ne-

estas pli komprenebla ol por franc- aŭ ital-parolantoj”. Tio iom subtenas miajn proprajn komentojn, tamen mi demandas min ĉu la aŭtoro ne iom troigas. Certe la romanĉa estas influita de la germana, kaj germanlingvano ĉiam estos komprenata se, pro manko de romanĉa vorto, li anstataŭe uzas germanan, tamen kiam latinido aŭdas la romanĉan radion, li rapide kaptas pri kio temas. Kaj la kono de la itala ankaŭ helpas kompreni kaj lerni la romanĉan, tiom pli, ke la romanĉoj ofte parolas itale.

Mi esperas, ke mi sukcesis doni al vi emon al legado de tiuj du libroj kaj al malkovro de la romanĉa lingvo same kiel al ĉiuj svisaj lingvoj, kiuj estas plurkultura riĉeco de tiu lando.

En la venonta numero de *Etnismo* vi havos la okazon pli bone konatiĝi kun Gereon Janzing tra recenzo de alia verko : “Kannibalen und Schamanen” (Kanibaloj kaj ŝamanoj).

Notoj

¹ Romandio estas la francparola parto de Svislando (Ĝenevo, Vaŭdo, Neŭŝatelo, Ĵuraso, Berna Ĵuraso, duono de Valezo kaj Friburgo). Ĝia indiĝena lingvo, krom por Ĵuraso, estas la francprovenca/arpitana, plu parolata en Valezo, Friburgo kaj iom en Vaŭdo.

² La romanĉa lingvo estas unu el la lingvoj de la grizona kantono, la plej orienta de Svislando. Ĝi apartenas al la retaj lingvoj de Retio, la alpa regiono de la Romia Imperio, kaj krom en Grizono ĝi estas ankaŭ parolata en Norditalio, en Dolomitoj kaj en Friulo. (*Etnismo* 50 p. 20-21, 79 p. 15, 80 p. 23). En Grizono ĝi estas parolata laŭ kvin variantoj: *vallader*, *puter*, *sutsilvan*, *surmiran*, kaj *sursilvan*.

³ *Dominique Stich* ankaŭ tradukis la Tinĉjan bendostrion, *L’Affaire Tournesol*, al la francprovenca/arpitana: *L’afère Pecârd*. *Etnismo* 79.

⁴ Vidu intervjuon aperintan en *Etnismo* 75 p. 12-16.

⁵ *Kauderwelsch* signifas -ĵargono-, ne komprenebla lingvaĵo. “Tiu vorto estas transformiĝo de la vorto *-kauerwelsch-*, kiu signifas: romanda (*welsch*) lingvaĵo el Koiro (*-kauer-* en iuj ĝermanaj elparoloj de orienta Svislando – tamen en Alemano *-Koiro-* dirigas *Chur*). Tiu esprimo do indikas la romanĉan foje parolitan en Koiro, ne kompreneblan por la najbaraj germanparolantoj.” El “*Parlons romanche*”.

Bibliografio:

– *Parlons francoprovençal, une langue méconnue* 1998,

– *Parlons romanche, la quatrième langue officielle de la Suisse*, 2007,

– *Parlons schwytzertütsch, le suisse-alémanique*, 2002, *Domini-que Stich*, eld. *L’Harmattan*, 5-7 rue de l’Ecole-Polytechnique; 75005 Paris.

www.librairieharmattan.com.

– *Minidicziunari rumantsch-franzos, franzos-rumantsch*, *Domini-*

que Stich, eld. *Yoran Embanner, Liligas, Fouesnant*, 2006. Ankaŭ en la germana, itala kaj angla.

– *Rätoromanisch Wort für Wort. Kauderwelsch Band 197*, *Gereon Janzing*, eld. *Reise Know-How*, www.reise-know-how.de

(Tiu artikolo aperas samtempe en *SES-informas* kaj en *Etnismo*.)

Interlingvistiko por laikoj

● *Recenzas Andreas Künzli*

„En la serĉado de la mondo-lingvo aŭ interlingvistiko por ĉiuj“. *Aleksandr Duliĉenko*. Tradukis A. Korĵenkov. Sezonoj. Kaliningrado. 2006. 159 paĝoj. Prezo: 15.00 €


Kiel la aŭtoro enkonduke emfazas, la homa lingvo estas unu el la mirakloj de la mondo. Laŭ klasika prezentomaniero, la fenomeno de la multlingveco sur la tero formiĝis per la legendo pri la Babelturo, kiu kompreneble ne mankas ankaŭ en la teksto de la recenzenda libro de Duliĉenko. Neniu povas hodiaŭ fiksi la ekzaktan nombron da lingvoj. Verŝajne temas pri nombro inter 5000 kaj

6000, sole en Hindio oni registris 1652 pecojn, dum en la mondo ekzistas ĉirkaŭ 2500 popoloj; sed ĉirkaŭ duono da lingvoj de la tero ĝis nun restas nestudita, precipe en Afriko kaj Papu-Nov-Gvineo. Sekve senlimaj estas la perspektivoj de lingvistiko; oni malkovras novajn lingvojn, sed lingvoj ankaŭ malaperas. Fakte nur ĉirkaŭ 300 lingvoj en la mondo estas literaturaj, dum miloj da ceteraj eĉ ne havas skribon.

Multlingveco kiel pliriĉigo kaj obstaklo

Kiel konate, religio traktis multlingvecon kiel punon de dio, kaj dum jarcentoj multlingveco estis perceptata kiel io ĝena, kion

oni akceptis kiel donitan. Laŭ aktualaj sciencaj konceptoj la multecon kaj diversecon de la lingvoj oni devas trakti kiel fenomenon dialektikan, nome unuflanke ĝi buntigas la mondon, aliflanke ĝi disigas la popolojn kaj funkcias kiel obstaklo en internacia komunikado. En tiu senco, lingvo povas servi aŭ kiel ponto aŭ funkcii kiel muro aŭ bariero.



La plej tradicia rimedo por superi la lingvobarojn konsistas en la lernado kaj alproprigado de fremda(j) lingvo(j). Jes sed kiom da lingvoj homo povas alproprigi al si kaj ĉu tio dependas de aparta talento? Paul Ariste, la elstara, bedaŭrinde forpasinta lingvisto de la tartua universitato, kiu estas intervjuita en la libro de Duliĉenko, kredis, ke la homo povas

aktive aŭ bonege posedi nur malmulte da lingvoj. Male lia samurba kolego Pent Nurmekund pensas, ke ĉiu homo povas lerni multajn lingvojn kaj por tio ne necesus specialaj kapabloj. Duliĉenko mem ne havas apartan respondon al tiu demando, sed tute prave konfirmas, ke la ekposedo de fremda lingvo, inkluzive de planlingvo kiel Esperanto, signifas grandan intelektan penadon, ĉar oni devas eliri ekster la kadron de sia propra lingvosistemo, kiu estis akirita en la infanaĝo. Transiri tiujn limojn estus malfacile.

Pri artefariteco

Parolante pri artefariteco de planlingvoj, oni ne forgesu, ke ankaŭ literaturaj lingvoj estis kreataj artefarite. Kiel Duliĉenko klarigas, la kreado de la literatura lingvo kaj ĝia enkonduko en diversajn sferojn de uzado apartenas al la lingvokonstruado aŭ lingvoplanado, kiu siavice estas parto de la sociaj kaj kulturaj taskoj de la socio.

La ideo de la artefarita planlingvo aperis kiam la homa menso perceptis la senlimecon kaj la diversecon de la lingvoj. La 19a jarcento estis vera labirinto por universallingvaj eksperimentoj. Dum en antaŭaj tempoj ĉefe filozofoj esprimis sin pri la problemo de la universala lingvo, en la 19a

jarcento, kiam estis kreita la bazo por kompara-historia lingvistiko, ankaŭ iuj gravaj lingvistoj komencis atenti kaj studi tiun temon.

Librokritiko

Verkante libron pri interlingvistiko, unuavice la aŭtoro devas esti tre bone informata kaj dokumentata pri fakte ĉiuj esencaj aspektoj kaj tendencoj de interlingvistiko: kaj lingvistikaj-sociolingvistikaj kaj lingvo-sociologiaj, kaj lingvofilozofiaj-lingvoplanaj-lingvopolitikaj, kaj histori(ograf)aj. Do signife estus trakti ankaŭ la biografian fonon de Schleyer, la politikan kuntekston en kiu la *judo* Zamenhof kreis sian lingvon, la homaranismon de Zamenhof, la devenon kaj vivon de von Wahl ktp. Ankaŭ gravus ne forgesi la elstaran rolon de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu estis fondita en 1908 nelaste kiel sekvo de la Ido-skismo, por la pluekzistado de la Esperanto-movado, kaj de la Universalaj Kongresoj, kiuj esence vivigas tiun movadon ĝis nun, ebligante ankaŭ interlingvistikajn agadojn kaj diskutojn en sia sino.

Ĝenerale forestas fontindikoj en la tuta teksto, tiel ke ne estas klare, kio originas de la aŭtoro mem kaj kio devenas de duagradaj fontoj kaj pri kiuj fontoj temas. Krom fontoj oni dezirus ankaŭ koni biografiajn indikojn de pluraj

menciitaj rusoj kiel Ĉeŝiĥin, Ĉernuŝenko, Ĉiviliĥin, Zelenin, Vengerov k. a., kiuj al la nerusa leganto ĝenerale ne estas konataj. Ĉar marksismo-leninismo iĝis eksmoda, oni ne povas simple forviŝi atentigojn pri ĝi en la koncerna kunteksto. En la (tro minimumeca) bibliografio de la libro de Duliĉenko forestas la nemalatenblaj kaj nepretervideblaj klasikaj esperantologiaj kaj interlingvistikaj kontribuoj de Waringhien, Auld, Privat, Szerdahelyj, Manders, Lapenna, Tonkin, Silber, Carlevaro, Piron, Wells, Bormann, Lins, Duc Goni-naz, Ito Kanzi, Fiedler, Aleksandr S. Melnikov, k. a. Kun la konsekvenco, ke la teksto de la libro devas 'vivi' sen la verkoj de tiuj aŭtoroj. Krom tio la indikitaj fontoj estas tro malnovaj. Logika sekvo de maltrafita literaturo estas ankaŭ, ke, nek la interlingvistikaj agadoj en GDR kaj Svislando, nek la esperantologiaj konferencoj okazintaj siatempe en Pollando, de LF-koop kaj dum UK, nek, ekzemple en ĉapitro 13 aŭ 14, la Nitobe-seminarioj, kiuj estas grava forumo kuniganta esperantistojn kaj signifajn lingvofakulojn el ekster la Esperanto-movado, estas konsideritaj. Krom tio, la teksto de Duliĉenko estas ĝenerale tro forte fokusita sur rusdevenaj referencoj, tiel ke aperas la impresoj, ke la libro estas verkita

unuavice por legantoj en Ruslando, Estonio kaj la ekssovetia zono. Do la teksto de Duliĉenko en tiu libro devus esti pli forte 'internaciigita'.

Kvankam laŭ ĝia subtitolo „por ĉiuj“ konceptita kiel sciencpopulara verko por laikoj, kiuj ŝatus intimiĝi kun la historio kaj teorio de interlingvistiko, eble estus utile verki didaktike pli taŭgan libron (kun ekzamen-dandoj kaj ekzercoj je la fino de ĉiu ĉapitro, ilustraĵoj, originalaj dokumentaj tekstoj akompanaj kaj interligitaj, taŭga grafika koncepto, ktp.) ? Enhave kaj metodike la libro estas eksmode konceptita. Sendube, la libro estos legata ankaŭ de pluraj nelaikoj aŭ studentoj pri la temo, kiuj ŝatus utiligi la tekston kiel lernolibron. Nature la libro devis, nelaste ankaŭ pro komercaj kriterioj flanke de la eldonejo, resti multloke iom supraĵa, limiga kaj simpleca en la klarigoj, ĉar ĝi iĝus tro ampleksa. Tiel estiĝis 'popolarscienca' verketo surbaze de la ruslingva originalo (ankoraŭ ne eldonita).

Horizonta larĝigo necesas

Nelaste, la libro de Duliĉenko donas ankaŭ la okazon por iom mediti pri la aktuala stato de interlingvistiko kaj la ebloj de ĝia pluevoluado. Estas tempo por fari novajn paŝojn en interlingvistiko. Laŭ mi la interlingvistoj devus

serĉi kaj trovi pli forte la kontakton *ankaŭ* kun la modernaj debatoj en lingvoanalitiko, lingvofilozofio, lingvopolitiko, lingvosociologio, lingvohermeneŭtiko, lingvokulturologio, lingvokibernetiko, konsiderante la gravajn verkojn de mondfamaj lingvofilozofoj nacilingvaj. Necesus do kiel interlingvistoj aktive partopreni en la debatoj pri poststrukturalismo, pragmatismo, instrumentalismo, komunitarismo, fenomenologio, kulturfilozofio, analiza lingvofilozofio kaj aliaj tendencoj aŭ skoloj. Kial finfine ne establiĝu aparta *interlingvistika skolo* post aŭ apud la historie signifaj jungramatika, kazana, moskva, ĝeneva, praga k. a. lingvistaj skoloj ?

La teksto estas verkita en facila lingvaĵo, sen tro da neologismoj, greklatinaj fakterminoj aŭ doktaj pseŭdointelektaj esprimoj, kaj lerte esperantigita far Aleksandr Korĵenkov surbaze de la rusa originalo. La mankojn ĉi tie notitajn necesus ĝustigi en nova, laŭ la supraj sugestoj plilaborenda, kompletigenda kaj aktualigenda eldono pli moderntipa (ekzemple laŭ la modelo de la kompareblaj germanaj (popular)sciencaj UTB-poŝlibroj). Kiel ĝenerala enkonduko bone strukturita en la fakan temaron ĝi plenumas, por la unua momento, sian intencitan celon de „diakrona esplorado de la ideo de

la komuna lingvo ekde la antikva epoko ĝis la nuntempo“.


Andreas Künzli

(*La pli longa versio de tiu recenzo aperis en LF 226/2007*).

La Zamenhofstrato

- *Recenzas Andreas Künzli*

„Zamenhof-strato, La”. *Roman Dobrzyński*. Varpas, Kaunas 2005 (2a eldono). 288 paĝoj. Prezo: 18,00 €.



Principe temas pri tre originala kaj aprobinda ideo kompili libron pri la historio de Esperanto surbaze de intervjuo kun la (remalkovrita) nepo de L. L. Zamenhof, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof (*1925). Finfine mi havis la okazon legi la libron de la konata

pola esperantisto Roman Dobrzyński kaj prikomenti ĝin. Kiel sviso mi ĝojas, ke en pluraj okazoj Svislando estas menciita en pozitiva senco. Tamen ĉe mi aperis kelkaj demandosignoj ĉefe pri la aŭtentikeco de la intervjuo mem.

Emociigaj estas la respondoj de Zaleski al la demandoj faritaj al li en la unua ĉapitro titolita „La Muroj“, en kiu la nepo rakontas, laŭ siaj disponeblaj memoroj, pri la vivo en la varsovia getto dum la germana okupacia tempo en Pollando. Sensacie estas legi, kiel la 14-16-jara knabo moviĝis trans la muroj de la getto kiel muso aŭ serpento kaj povis savi sian propran vivon dank’ al la hazardo, kiel tio siatempe estis la kutimo, krome dank’ al la cirkonstanco, ke mankis al li la cirkumcido. Per siaj memoroj Zaleski, kiu iam nomiĝis kiel sia fama avo Ludwik Zamenhof, kontribuas al la priskribo de la situacio en la varsovia getto, pri kiu la monda publiko legis en la priholokaŭsta literaturo nacilingva (komparu ekzemple la memorojn

de Marcel Reich-Ranicki aŭ de Ignaz Bubis). Plej impresa estas la konstato, aŭ konkludo, de Zaleski, ke li neniam povis liberiĝi de la konvinko, ke pro sia nomo pereis lia patro, Adam Zamenhof. En tio do kuŝas la ĉefa tragiko – kaj paradokso – de la nomo Zamenhof. Kiel sciante, la patro Adam estis mortpafita, kaj pluraj familianoj pereis en la nazia koncentrejo de Treblinka. Sendube oni dezirus ekscii pli multe el la persona memoro de Zaleski pri la getto, la zamenhofa familio kaj la Zamenhof-strato mem, sed evidente lia rakontkapacito estas limigita, ĉar kiel knabo en tiu aĝo oni povas kutime konservi nur fortajn impresojn kaj ĝeneralajn memorojn. Aliflanke oni povas kompreni kaj devas agnoski, ke Zaleski, viktimo de la kontraŭjuda genocido, malvolonte refreŝigas plej dramajn epizodojn de sia vivo.

Post la milito ne Esperanto estiĝis la vivocelo de la nepo de L. L. Zamenhof, kiu devojiĝis de la familia tradicio kaj ne fariĝis kuracisto, sed konstruĝenero kun doktora titolo. Kiel specialisto pri prembetono Zaleski kunlaboris en diversaj grandaj konstruprojektoj kaj havis tiel la okazon vojaĝi ĉirkaŭ la mondo. En la dua ĉapitro pri „La Insuloj“ Zaleski donas detalajn informojn pri siaj profesiaj aktivecoj. En la (Zamenhof)-jaro 1959 li elmigris de Pol-

lando al Francio kaj tiel, ŝajnas al mi, li fremdiĝis rilate sian patrujon kaj dume ankaŭ distanciĝis de la Esperanto-movado. Evidente li ne tro ŝatis ludi la rolon de la nepo de Zamenhof, al kiu oni konstante fingromontris, en universalaj kongresoj aŭ aliokaze. La plezuro ludi la rolon de la LLZ-nepo reaperis ĉe Zaleski fakte nur post lia pensiiĝo. Sed intertempe trafluis 40 jaroj.

En sia postparolo Dobrzyński konfesas, ke li grandparte mem redaktis la tekston, do sekve ankaŭ helpis doni la respondojn de la intervjuito. La plej grandaj duboj pri la aŭtentikeco de la respondoj, kaj en tio konsistas mia ĉefa kritiko al la libro, aperas plej malfrue en la ĉapitroj „La turoj“ kaj „La vojoj“. Nome por kompetente respondi la demandojn pri esperantologio kaj interlingvistiko kaj por klarigi la historion de Pollando, kio estas la kazo en la libro, oni devas esti bona konanto de tiuj temoj. Kredeble Zaleski ne estas fakulo pri tiuj temoj. Ni tamen kredu, ke interparoloj pri tiaj temoj pli malpli intense okazis inter la intervjuinto kaj intervjuito. Laŭ la indikita bibliografio la respondoj evidente estis prilaboritaj surbaze de la esperantologia fakliteraturo.

En la lasta ĉapitro „La pontoj“ la konversacianta duopo profiliĝas kiel filozofoj pri la nuntempaj

problemoj de la mondo: temas pri intelektaj kaj inteligentaj konsideroj pri militoj, nukleaj armiloj, ekologio, medicino, libereco, senlaboreco, libertempo, angla lingvo, naciismo, islamo, terorismo, demokratio ktp. Sed denove: ĉu la respondoj de Zaleski al ĉiuj tiuj demandoj estas vere aŭtentikaj? Ĉiukaze ili estas, kiel ĉio cetera, verkitaj en senriproĉa Esperanto, bone prilaboritaj, strukturitaj kaj kompilitaj el pluraj konversacioskizoj, kiujn Dobrzyński havis kun Zaleski ekde 1993.

Eĉ se evidentiĝas, ke Zaleski ne deziris fariĝi ia mito aŭ legendo, fine de la konversacio tamen restas la impresoj, ke li fieras pri sia nepa rolo, kiun li nun pli ĝuas ludi en sia alta aĝo ol iam ajn antaŭe. Resume: plej interesaj kaj valoraj, ĉar aŭtentikaj, do estas la unuaj du ĉapitroj pri la varsovia

getto kaj la profesia kariero de Zaleski. Fakte oni ŝatus legi pli abunde pri la privata kaj profesia vivo de Zaleski, sed li preferas esti diskreta. Tial grandparto de la libro aspektas iom konstruite, almenaŭ por la esperantista leganto, kaj mi esperas, ke la libro, origine pollingve verkita, vekis despli fortan intereson ĉe la nacilingva publiko, al kiu ĝenerale mankas objektivaj informoj pri Esperanto. Ĉu tamen la esperanta versio taŭgas por laŭvorta tradukado en la germanan lingvon, ekzistas kelkaj duboj. Nome por ke la nacilingva celpubliko pli bone komprenu multajn aferojn menciitajn en tiuspecaj libroj, almenaŭ devus esti faritaj la necesaj aldonaj klarigoj en piednotoj.

(Ĉi tiu recenzo aperis en *Esperanto aktuell* 3/2007, p. 22.)

Kiel trovi ion en informadika CDELI-katalogo ?

Tria parto

(La unua kaj dua partoj aperis en *SES informas* 2007-2 kaj 3)

Respondu la jenajn demandojn (skribe aŭ per la reto) antaŭ la fino de januaro 2008 !
kaj vi eble havos la bonŝancon ricevi premion...

1/ Kiom da noticoj estas nun registritaj kun la mencio cdeli (CDELI) ?

2/ Ĉu CDELI posedas (jam registritajn) verkojn de *Agatha Christie* ? Se jes, kiom ?

3/ Kial CDELI konservas la franclingvan verkon *Treize à la douzaine* (de *Frank Gilbreth*) ?

4/ Iu en Lucerno ŝatus prunti la verkon *Absolutismo* de *Lanti*. Ĉu tio eblas, kaj, se jes, kiel fari ?

5/ Iu en Ĝenevo ŝatus prunti la verkon *Magie blanche* de *Luiza Carol*. Ĉu tio eblas, kaj, se jes, kiel fari ?

Martine Schneller

martine.schneller@ne.ch

Novan ekzercon vi malkovros en *SES informas* 2008-1.

10 dekminutaj videoprogramoj de Claude Piron pri lingvoj

Eble interesos vin ekscii, ke serio de 10 dekminutaj franclingvaj videoprogramoj pri lingvoj, en kiuj Claude Piron laŭgrade kondukas al la solvo "Esperanto", estas trov-eblaj sur Youtube. Sufiĉas tajpi "Youtube + Claude Piron" por atingi ilin. Aŭ oni povas iri al www.youtube.com/dannirlsne kaj alklaki sur la cifero interparenteza post "Videos". La titolo de la serio estas "*Les langues: un défi*" ("*La lingvoj : defio*"), kaj tiuj de la 10 programoj estas la jenaj :

1. Se comprendre (Interkomprenighi).
2. La diversité des langues (Lingva diverseco).
3. Le handicap linguistique (Lingva handikapo).
4. Les instances internationales (Internaciaj institucioj).
5. Passer d'une langue à l'autre (Transiri de lingvo al alia).
6. Les langues, ça coûte (Lingvoj, tio kostas).
7. La peur du réel (La timo al la realo).
8. Le fonctionnement du cerveau (Funkciado de la cerbo).
9. Programmation génétique (Genetika programado).
10. La solution. (La solvo).

Estante nek juna nek bela, kaj ne sentanta sin hejme antaŭ kamerao, Claude Piron estis skeptika pri la afero, sed li ricevis mesaghojn de homoj, kiuj dankas kaj gratulas lin. Ŝajnas do al li, ke estas ia efiko en la entrepreno.



Svisa kalendaro

Decembre

- 15 : Basel : ESB : Zamenhofa festo en Francio.
- 15 : Genève : Zamenhofa festo.
- 15 : Lausanne : Zamenhofa festo.

2008 Januare

- 9 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 9 : Luzern : Konversacia rondo.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Februare

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 7 : Zürich : Ĝenerala Kunveno de ESZ.
- 13 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 16 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Marte

- 11 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 15 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Aprile

- 04 : Limdato por proponoj al la Ĝenerala Kunveno de SES.
- 12 : Chaux-de-Fonds : SES : Ĝenerala Kunveno.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Maje

Junie

- 7 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 11 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Julie

Aŭguste

Septembre

- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Venonta redakta datlimo de *SES informas*: 2008 Januare 10

La gvidantoj de la lokaj kaj fakaj societoj bonvolu atenti pri la venonta datlimo redakcia por la periodo januara-marta de la venonta *SES informas* 2008-1, kiu aperos fine de januaro 2008. Ili informu pri la datoj de la kunvenoj por la monatoj februaro, marto kaj aprilo 2008 kaj eĉ por la tuta jaro 2008. Kaj ili ne forgesu raporti pri okazintaĵoj. Antaŭdankas pro tiu redakta kunlaboro Claude Gacond.